Jaro I. BULTENO de Numero 1.

ĈEĤOSLOVAKA P R E S O ESPERANTA

Eldonato kaj responda redaktoro:Aug.Pitlík,
Praha II, Křemencova 17.

Gesamideanoj estas petataj presigi en lokaj ĵurnaloj la subajn artikolojn kaj sendi unu ekzemplecon al la redakcio.

-.-.-.-.-

## Praha – urbo de mondturistiko.

Praha, ŝefurbo de Ĉeĥoslovaka respubliko, nomata pro sia situacio kaj histori "Romo de l' nordo", estas por fremdulo viva muzeo de arĥitekturo, en kiu kuniĝas ĉiuj konstruaj stiloj, de la romana ĝis la plej moderna.

Jam depost mezepoko estis Praha ofte vizitata de fremduloj, kiuj venadis ĉi tie parte pro politikaj motivoj, ĉar Praha estis dum certa tempo sidejo de romgermanaj imperiestroj, parte pro komerco kaj arto, kiuj ĉi tie floris. En intereso de scienco kaj arto la bohemaj regnestroj kunvenigadis ĉe siaj kortegoj eminentajn eksterlandajn scienculon kaj komisiis fremdajn artistojn konstrui en Praha vicon da palacoj, kiuj ĝis hodiaŭ beligas la urbon. La universitato de Praha estas la plej malnova fonto de scienco en mezeŭropo, el kiu ĉerpis anoj de la plej diversaj nacioj.

Ne mire do, ke ne ekzistas kultura nacio, kies anoj ne estis vizitintaj Prahan, kaj ne trovus tie signojn de iliaj agoj.

En la muzeo de Náprstek trovas A m e r i k a n o multe da objektoj, kiujn kun granda diligento kaj elspezoj en Norda Ameriko kolektis Vojta Náprstek. A n g l o enpensiĝas en la preĝejo de st. Tomo ĉe la tombo de sia verkistino Vestonia kaj D a n o ne forgesos certe viziti la tombon de fama dana astronomo Tycho de Brahe en preĝejo de Tyn. F r a n c o j interesiĝas pri multaj konstruaĵoj, rilatantaj al imperiestro Karolo IV., kiu estis edukita ĉe franca kortego kaj kies patro Johano de Lucemburgo mortis pro gloro de Francujo sur la batalejo apud Cressy. La katedralo de sankta Vito estis konstruita laŭ planoj de Mathieu d´Arras, kiu ankaŭ grandan ĝian parton mem konstruis. En emaŭza monaĥejo oni okupis sin pri slava liturgio laŭ evangelio, kiu troviĝas en la biblioteko de Reims kaj je kiu la francaj reĝoj ĵuris dum kronsoleno. La muregojn ĉirkaŭ la Nova urbo de Praha, fondita de Karolo, konstruis en la XVIIIa jaro., francaj inĝeneroj. Panoramo de pontoj de Praha rememorigas Parizanon pri simila scenerio de 8 seinaj pontoj kaj la observa turo sur monteto Petřín pri ĝia kvinoble pli granda pariza modelo-turo de Eiffel. La bildoj de Rubens en galerioj de Praha vekos intereson de N e d e r l a n d a n o .

I t a l o j   ankaŭ trovos en Praha multon, kio tuŝas ilian kulturon. Loĝioj de kelkaj preĝejoj precipe "Casa sancta" en Loreto, reĝa kasteleto "Belvedere" kaj la tuta palaco de Valdstein rememorigas la arton de italaj majstroj Veneciano interesiĝos pri la tiel nomata "Venecio de Praha". En proksima somerrestadejo Rostoky oni trovas vilaon de inĝ. Hloucha, kiu tie provas elserĉi el japana materialo japanan medion. Multe da memorandaĵoj en Praha allogos G e r m a n o j n , kies artistoj estas tre oftaj gastoj en Praha, precipe dum regado de germanaj imperiestroj. La plej memorindaj konstruaĵoj "Stona ponto" kaj katedralo de st. Vito estas verkoj de Ŝvabo Petro Parlier, basiliko de st. Georgo de Sakso Werher. P o l o j en la katedralo vizitas maŭzoleon de reĝino Anna, devenanta el pola reĝa familio de Jagello. A ŭ s t r i a n o j admiras la palacon de Clam-Gallas, verkon de Fischer el Erlach kaj interesplene haltiĝas antaŭ domoj, en kiuj Mozart kaj Beethoven loĝis en Praha. R u m a n o j n interesas bronza statuo de st. Georgo, fandita en la j. 1373 en Cluj kaj donacita de Karolo IV. al Praha.

Por R u s o j estas ankaŭ interesaĵoj en Praha: kristala lustro, donaco de caro Nikolao, en iama rusa preĝejo de st. Nikolao, kie de la j. 1891 okazis rusaj diservoj kaj kies rekonstruon subtenis la caro per 3000 rubloj. S u d s l a v o j vizitos monaĥejon Emaŭzy, kie dalmaciaj monaĥoj iame diservis, uzante malnovslavan lingvon. Multe da objektoj en Praha ekinteresos S v e d o j n , kies armeoj dum la 30 jara milito kelkfoje vizitis Prahan. Konatan batalon sur la Ŝtona ponto prezentas plastika bildo de fratoj Liebscher, troviĝanta en turista dioramo sur Petřín. En palaco de Waldstein estas kopioj de statuoj, kies originaloj, forveturigitaj Svedujon dum la invado, nun ornamas seĝajn svedajn palacojn. Ankaŭ S v i s o j trovos en Praha ion, rilatantan al ilia lando. Legendo pri kavaliro Horymír, kiu de roko de Vyšehrad sur ĉevalo Šemík desaltis kaj transnaĝis riveron Vltava, al li reproduktos similan historion, okazintan laŭdire dum pratempo antaŭ la katedralo de Bern. -

Per la diritaĵo ne estas elĉerpita la roĉeco de komuna homa kulturo, konservita en Praha, pri kio ĉiu vizitanto de Praha propraokule povas facile konvinkiĝi.

## Dek jaroj de la Ĉeĥoslovaka respubliko
/1918-28.X. - 1928/

La jaro 1918 estas en la historio de la Ĉeĥoslovaka nacio la plej memorinda kaj feliĉa, ĉar tiun jaron la 28 an de oktobro estis renovigita la malnova Ĉeĥa ŝtato per kreo de la Ĉeĥoslovaka respubliko. En la jaro 198 plej forte batis la ĉeĥa koro por la patrujo ne sole en la ĉeĥaj landoj de estint Aŭstrio, sed ankaŭ en eksterlando, kie la ĉeĥoslovakaj armeoj brave batalis por la ĉeĥoslovaka sendependeco, perdita en la j. 1620 en la batalo sur Blanka monto. La 28 an de oktobro 918 revenas fine la regado je la ĉeĥoslovaka nacio denove en ĉeĥoslovakajn manojn, kion jam la fama Ĉeĥo Comenius sopiregis.

Estas memkompreneble, ke la deka datreveno de la estiĝo de la Ĉeĥoslovaka respubliko estos en la tuta ŝtato solene festata ne sole la 28an de oktobro 1928, kiam antaŭ 10 jaroj eksplodis e Praha la liberiganta revolucio, sed ankaŭ je aliaj tagoj, rememorigantaj opajn fazojn de la tiurilata nacia penado hejma kaj eksterlanda batalado por la sendependeco, okazinrajn dum la j. 1918. - La datrevena rememoro pri la j. 1918 fortigos la ĉeĥan nacian al blaboro en intereso de ordo kaj paco en Ĉeĥoslovaka respubliko.

. . . o O o . . .

Miljara datreveno de la morto de sankta Venceslao, protektanto de Ĉeĥoslovakoj.

En la jaro 1929 rememorigados al si la Ĉeĥoslovaka nacio la mortiĝon de sankta Venceslao, okazintan antaŭ mil jaroj la 28an de septembro 929 kaj semtempe la bonfaran kaj utildonan regadan de ĉeĥa pronco, pruvantan, ke la ĉeĥa nacio ne ekzistas nur de la j. 1918.

La ĉeĥaj homoj -ili apartenu ial kiu ajn religio kaj politika partio- konsideras la miljaran tradicion pri sankta Venceslao morala posedaĵo de la tuta nacio, kiu fortigis la Ĉeĥojn ne sole en tagoj de nacia gloro sed ankaŭ trucentjara subpremo.

La miljara datreveno de la morto de sankta Venceslao estos festata solene en la jaro 1929 en Ĉeĥoslovaka respubliko per ekspozicio pri sankta Venceslao, malfermota en printempo 1929, kiu samtempe montros miljaran evoluon de la ĉeĥa nacio, kaj malfermo de la finkonstruita atedralo de sankta Vito en Praha je la mortotago la 28an de septembro 1929, por kiu fundamentoj estis metitaj de st. Venceslao mem.

La ĉefaj solenj komencos la 26an kaj finos la 29an de septembro per adorado de popolo al sankta Venceslao. La kamparanoj venos al Praha en naciaj kostumoj, kies belecon admiras eksterlando. Dum la jubilea jaro okazos en Praha multaj kongresoj, precipe kongreso de katolika gimnasta societo "Orel", katolika junularo k.t.p. -

Aliĝojn en fremdlando akceptas kaj esperantajn tiurilatajn informojn dissendas "Komitato por festo de miljara datreveno de la morto de sankta Venceslao" en Praha IV. Kanovnická 13.

Ĉeĥoslovaka ekspozicio de la samtempa kulturo en ČSR.

Je pentekosto la 27an de majo 1928 estos malfermota sub protekto de la ŝtata prezidanto T.G.Masaryk en moravia urbo Brno en 16 pavionoj Ĉeĥoslovaka ekspozicio de la samtempa kulturo en Ĉeĥoslovaka respubliko. Ĝi prezidentos al la vizitanto ne sole instruon pri la nuna stato de ĉiuspeca kulturo en ČSR sed ankaŭ pruvos ĝian suprenleviĝantan tendencon jam dum la unua dekjaro de ekzisto de la ŝtato.

Olimpiado de Ĉeĥoslovaka kantistaro

okazos sub protekto de la ĉefurba estraro je pasko la 7-9an de aprilo 1928 en Praha. Je la programo, konsistanta el unuarangaj kantnumeroj de ĉefaj ĉeĥaj komponistoj, partoprenos 4800 kantistoj kaj ĉefaj ĉeĥaj kantistaj societoj.

. . . o o o O o o o . . .